



BULTENO


DE LA GERMANA ESPERANTA FERVOJISTA ASOCIO

Organ der Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten im Bundesbahn-Sozialwerk

Numero 4 · Julio/Augusto 1962

Al la 6-a jarkunveno (20./21. 10. 1962) invitas

MÜNSTER en Vestfalia



La stacidomo postmilitre rekonstruite

Kie antaŭ 2000 jaroj la indiĝenaj popoloj haltigis la norden marŝantajn romajn legiojn, tie en nia epoko senbare fluas la vartrafiko inter la Rejnvalo kaj la Germana Maro. Kie la glavo de imperiestro Karlo la Granda antaŭ pli ol 1000 jaroj konvertis ĝermanajn gentojn, tie nun centro de nedividebla kulturo disradias en la ĉirkaŭan landon kaj trans la limon. Kie en la pasinta jarcento ĉarotrajnoj sekvis la venkantajn armeojn de Napoleono, tien hodiaŭ kondukas la vojaĝantojn modernaj vagonaroj de la Germana Federacia Fervojo: 13 horojn de Kopenhago, 9 horojn de Parizo, 8 horojn de Baselo, 5 1/2 horojn de Bruselo kaj

nur 3 1/2 horojn de Amsterdamo situas Münster, la Metropolo Vestfalia, la urbo de nia 6-a jarkunveno.

Gastama amikeco

La gaston, kiu per fervojo atingas la urbon, kvazaŭ amike akceptas la nova stacidomo nia bildo. Ĝi servas lin per ĉiaj butikoj, informejoj, restoracioj, agentejoj kaj filmt teatro. La akceptejoj de la jarkunveno havos propran salonon en unu el la haloj. Münster afable prezentas al la fremdulo siajn logaĵojn kaj noblecon. Tute laŭplaĉe oni trovas kaj grandurbajn magazenojn kaj antikve kamparajn restoraciojn, zorge protektitajn arkitekturajn juvelojn el ĉiu epoko aŭ atestejn de

moderna konstruaro; ĉu oni serĉas rafinitan elegantecon aŭ ĉu honestan solidecon. Sed nur al amiko Münster malkaŝas siajn intimajn idiliojn, sian petolan ĝojon kaj sian kvietan gajon.

Historio en tilia krono.

Al promenado tra la historio invitas la floranta parkzono, mem atestanto de mezepoka fortikeco, Altaj muroj, profundaj fosajoj kaj larĝaj remparoj ofte protektis la riĉan urbon kontraŭ enmigrantaj najbaroj kaj avidaj militistoj, kie nuntempe ulmoj kaj tilioj zonas la antikvan urbokernon. Inter la silueto de la turoj imponas larĝa kaj kompakta la romanika katedralo. Pri tiu sama loko rakontas la historio, ke en la unuaj jarcentoj de nia erao sur tiu ĉi monteto apud vadejo kampuloj el saksa gento fortikigis sian kolonion per remparoj kaj palisoj. La franka imperiestro Karlo jam frue kristanigis la lokon kaj de la jaro 804 ĝi estas sidejo de episkopo. De tiam ankaŭ formiĝis ĝia kultura tasko. Nur malmultaj paperaj kaj ŝtonaj dokumentoj, jen skribo — jen mурparto, ankoraŭ reprezentas la iman episkopan kastelon, kolezion kaj monaĥejon, kiu donis al Münster tiun ĉi latinidan nomon el „monasterium“.

Pluvus aŭ sonoriloj sonas

Tio certe estas malica moko, ĉar ofte eĉ dum pluvo oni aŭdas sonoradon. Tamen tiun „monasteran“ proverbon parte pravigas la fakto, ke sole en la apenaŭ du kvadratkilometroj granda areo de la antikva kerno oni trovas 14 preĝejojn, plej multaj originas el la 11-a — 14-a jarcentoj. Kaj evidente ankaŭ pri pluvo pensis la civitanoj de la renesanca kulturepoko, kiam ili konstruis sian unikan foirplacon en la urbocentro: stratojn-longaj girlandoj da arkaĵoj ankoraŭ hodiaŭ estas ŝatataj promenejoj, kie eĉ dum pluvo sekapiede la ĉarmaj inetoj volonte vegetas de butikoj al butikoj. La renesancajn frontonojn de la burĝodomoj superas per alto kaj beleco la gotika urbodomo en aparte svelta stilo. Gravajn eventojn vidis la historia placo, tragediajn kaj ĝojigajn. Tie oni laŭte kaj vigle marĉandis pri varoj el kamparo kaj la vasta mondo; tie oni prezentis la kruelajn mezepokajn spektaklojn de publikaj

Sprachprüfung für Esperanto

Wie in den vorangegangenen Jahren ist auch während der 6. Jahresversammlung in Münster (Westfalen) Gelegenheit, die Sprach- und Kursleiterprüfung abzulegen,

Wir empfehlen unseren Mitgliedern, sich an einer dieser Prüfungen zu beteiligen. Nutzen Sie die davorliegende Zeit für eine gründliche Kenntnis der Internationalen Sprache.

Anmeldungen bei: Dr. Lang, Prüfungsamt der BD Frankfurt (M).

eksekutoj; tie solenaj procesioj kaj pompaj akceptoj scenis antaŭ la sama fono; tie ĝis hodiaŭ la tradiciaj festoj kaj solenoj trovas indan kulison.

Se la kato ne estas, jen dancas la musoj.

Eĉ la plej sanga ĉapitro de la loka historio, almenaŭ en sia komenco, ne malhavas komikajn trajtojn. En la 16-a jarcento, por Münster epoko de burĝa bonfarto, metia kaj komerca prospero, kiam la eŭropaj popoloj liberiĝis el katenoj de superstiĉo kaj servuto, ekkonscias pri socio homara kaj spirite luktas pro veroj kaj valoroj, la atmosfero de la urbo estas alttensie ŝargita, ĝis eksplodo saturita de novaj ideoj politikaj kaj religiaj. La rebaptistaj predikantoj trovis multajn adeptojn por speco de religia komunismo.

En 1534 la reganta princepiskopo kun siaj soldatoj devas militiri kontraŭ najbara urbo. Je tiu okazo la religia fanatismo atingas kulminon kaj sensanga revolucio proklamas novan epokon de malnovtestamenta Direĝado. Ĉiuj estajoj estu feliĉaj! La reveninta episkopo sin trovas antaŭ fermitaj pordegoj kaj pli fortikaj remparoj. 17 monatojn kun helpo de fremdaj armeoj li sieĝas sian urbon, en kiu anstataŭ Dio nun ekreĝas importita tajloro. Volupto kaj brutaj instinktoj sub lia diktatoreca regado inversas altajn idealojn je malmoralo, falsjustico kaj murdado. Longa malsato, venĝemo kaj perfido fine en terure sangeca buĉado dronigis la rubojn de la Miljara Regno. Kia paralelo kun okazintaĵoj de la plej juna historio. Tri feraj kaĝoj ĉe la gotika turo de St. Lamberti averte memorigas pri la severa puno alla tiamaj gvidantoj.

Milito kaj paco

Historia konscio kaj moderna koncepto formis la novan urbon el la ruinoj de totala milito. Inter la valorajoj, kiujn antaŭvida zorgemo protektis kontraŭ bomboj kaj brulo, restis paneloj, mebloj kaj ekipaĵo de la pacsalono. Post 30 jaroj, en la hispanaj Nederlandoj eĉ pli ol 100 jaroj da milito, subpremitaj ribeloj, embuskaj kaj malkaŝaj bataloj kun ĉiuj hororoj akcesoraj, la sopiro je paco por la eŭropaj landoj fokusis en la vestfalia metropolo. Delegitoj kaj ambasadoroj kvin jarojn intertraktis en Münster, kiu tiam kun 12000 loĝantoj krome gastigis milojn da fremduloj. Nur en la vinmonato de 1648 la packuriero povis ekrajdi por diskonigi la atenditan mesaĝon.

Dum la postaj jaroj princa feŭdalismo, peŝto kaj bruloj plagis la urbon. Nova prospero en la 18-a jarcento evoluigis la vestfalian brikbarokon kaj kreis stilajn unikaĵojn: kastelojn, palacojn kaj ekleziajn konstruaĵojn. En unu tia kampara vilaĝo, vera perlo de sia epoko, vivis kaj verkis la granda romantikulo Annette von Droste Hülshoff.

La nuna rolo de malnova urbo

Münster hodiaŭ loĝigas 180000 homojn. Centraj institutoj kulturaj, industriaj, komercaj, asekuraj metiaj kaj agrikulturaj havas sian lokon en Münster, sidejo ankaŭ de ĉefaj registaraj resp. ŝtataj organoj. El la urbomezo kilometroj okcidenten la universitato etendas siajn institutojn. Akademiojn por pedagogoj, inĝenieroj, metimajstroj kaj oficistoj oni trovas, el la lastaj menciinda: la moderna fervoja lernejo, kiu gastigos la

ĉi-aŭtunan jarkunvenon de GEFA. La Esperantistoj aktivas sub tri nomoj: Monastera Societo Esperantista, Fervojista Esperanto-Rondo kaj Studenta Esperanto-Klubo de la universitato.

Nigra pano tutgrajna, ŝinko kaj grenbrando ne trafas ĉies guston. Dorlotitaj palatoj preferu aliajn frandaĵojn. Sed tiuj produktoj de la vasta pejzaĝo, kies centron Münster reprezentas de mil jaroj, estas tiel honestaj, kiel la homoj ĉi tie kaj solidaj kiel ilia urbo.

W. Brandenburg

Sukcesplena kongreso de GEA

(9. — 13. 6. 1962)

Al Oberkirch, idille situanta en la Nigra Arbaro, la Germana Esperanto-Asocio estis invitinta je Pentekosto al la tiujara kongreso, kiun sekvis pli ol 300 personoj, inter ili ankaŭ GEFA-anoj. Dank' al la modela laboro de la malgranda loka grupo subtenitaj de la bonvola urbestro kaj favorigitaj de belega vetero la kongresaj aranĝoj okazis laŭplane kaj harmonie. Kulmino estis la Solena Malfermo kun la germanlingva festparolado de la GEA-prezidanto d-ro Herrmann, kiu substrekis la neceson de la Internacia Lingvo por la komuna Eŭropo. Reprezentantoj de kelkaj okcidentaj landoj akcentis la internacian karakteron de tiu kongreso. El Mezgermanio neniu reprezentanto povis partopreni. Oni pensis pri ili, precipe per lumbildprelego pri la nuna apartigita Berlino.

Dum fakkunveno de la komercistoj, kies problemoj iom similas al tiuj de GEFA, estis atentigata pri kvinlingva libro „Esperanto en Komerco“. Ĝi donas ekstraktojn el leteroj de Esperanton

Jubileo de fervoja linio

Ekde la 23-a de majo 1887, dum pli ol 75 jaroj, funkcias la fervoja linio de Freiburg (Breisgau) al Neustadt (Schwarzwald), kiu kondukas tra unu el la plej romantikaj regionoj de Germanio. Ĝi estas vaste konata ankaŭ pro teknikaj kaŭzoj. Sur distanco de 35 km estas superendaj 625 m de la altitudo. Tiucele devis esti konstruataj la t. n. Ravenna-viadukto (nia bildo),

uzantoj entreprenoj tutmondaj. Ankaŭ la feliĉe multnombra junularo havis sian kunvenon.

Por la katolikaj kaj protestantaj kristanoj okazis specialaj diservoj. Ekskursoj piede kaj omnibuse kondukis la kongresanojn al la ĉirkaujo de la Nigra Arbaro kaj al la fama Strasburgo. Gazetaro kaj radio raportis kontentige.

W. B.

7 tuneloj kaj aliaj apogaj muroj. La plej ekstrema deklivo de 1:18 sur 7 km longa trakoparto estis funkciigita de 1887 ĝis 1933 per dentrada lokomotivo, de 1933 ĝis 1935 per vaporlokomotivo de la serio 85, de 1935 ĝis 1954 per elektra lokomotivo kun unufaza korento de 50 hercoj kaj de 1954 kun la ĝenerale enkondukita korento de 16 2/3 hercoj.

W. B.

La vojaĝo

de Boris Pasternak

Plenenerĝi! la trajno hastas.

De kie, kien, kiu scias?

Laŭtsonas kanto de la radoj.

Rezin' odoras kaj abioj.

Betuloj sur deklivo kreskas.

Linio sin bobenas. Bukloj

konduktorinaj malordigas.

L'aer' amare, seke gustas

Pro fulgoflugo ĉe la trako.

Cilindroj, piŝtoj, stangoj brilas

entuziasme sen mezur'.

Sur la deklivon ombro falas

de akcipitro en la blu'.

Lokomotivo ĝemvestigas

vapore, kvazaŭ en ĉapel'.


Sed la arbar' neniom sentas

pri kuro, hasto kaj kiel

dum jam delong' pasintaj tempoj

ĝi staras, kiel iam, nun.

Trad. de W. B.



Ni legis en...

unu el la regionoj plej abundaj je florkulturoj.

W. B.

Bulgara Esperantisto, organo de la Bulgara Esperantista Asocio, publikigas (en la maja kajero) regularon pri la lingvaj ekzamenoj kaj daŭrigas la gramatikajn klarigojn.

Der Trichter / La Funelo, germanlingvaj sciigoj de la Esperanto-grupo Nürnberg okupigas pri aktualaj temoj en Esperantujo kaj pri grupaj novaĵoj.

El Popola Ĉinio, eldonata de la Ĉina Esperanto-Ligo akcentas (en n-ro 3) la kulturan signifon de la revuo per artikoloj kiel „La Juar, urbo de floroj kaj muziko“, „Pri la drakboata konkurso“ aŭ pri nova infanfilmo „Bela floro“.

Esperanto en Skotlando, Bulteno de la Skota Federacio Esperantista sub la sprita redaktado de T. Fraser. Kiu opinias la skotojn aparta speco de Britoj, trovas konfirmita sian supozon. **Franca Esperantisto**, organo de la Unio Esperantista Franca, donas trafen spegubildon pri la franca Esperantomovado. La aprila eldono raportas pri la ĝis antaŭ nelonge nedecifrebla etruska lingvo.

Graĵoj en Vento, buntpapero organo de la Tutmonda Interlernejaj Rondoĵoj, presita en Svislando, apelacias (en n-ro 69) al aktiva kunlaboro de interesigitaj lernejoj celante la enkondukon de Esperanto.

Informa Bulteno, organo de la Italie Fervojista Esperanto-Asocio, presigaa (en la eldono de majo/junio) koncizan favoran raporton pri la 14-a IFEF-kongreso en Budapeŝto.

Internacia Jurnalisto, organo de la Tutmonda Esperantista Jurnalista Asocio, presita en Bulgario, interese distingas inter la nefacilaj taskoj de esperantist-jurnalisto kaj tiuj de esperantisto-jurnalista.

Jugoslavia Fervojisto, organo de la Jugoslavia Asocio de Fervojistaj Esperantistoj. Estas priskribitaj (en la kajero de majo) la kategorioj de fervojaj akcidentoj kaj la konstruado de la fervojlinio Beograd — Bar. Regule paeras fakterminoj.

La Fervojisto, organo de la franca IFEF-sekcio pritraktas krom variaj grupraportoj kaj programanacoj la tiklan temon de la troa turistika karaktero de Esperanto-kongresoj.

La Gazeto, propagandilo ĉefe francalingva, kiu celas la disvastigon de Esperanto en Francio.

Svisa Fervojisto, bulteno de la Svisa Asocio de Esperanto-Fervojistoj en Esperanto kaj franca lingvo, raportas fideinde (en la aprila eldono) pri la ĝeneralkunveno en Basel.

The Worker Esperantist, eldonita de la Laborista Esperanto-Movado en Britio atakas (en la junia eldono) la tezon de Esperanto kiel neŭtrala lingvo.

ZPRAVY, dulingva informilo de la Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato, mencias (en la maja eldono), ke la eldonkvanto de nova lernolibro (3000 ekzempleroj) elĉerpigis dum unu tago.

W. B.

Somerrestado kiel gasto de la Britaj Fervojoj

Tiun someron la Britaj Fervojoj disponigos 234 kampadvagonojn, inter ili 47 kun luksaj instalaĵoj, en 130 feriolokoj ĉe la bordo kaj interne de Britio. La kampadvagonoj havas komfortajn litokupejojn por 4, 6 aŭ 8 personoj, grandana slonco kaj kompletan kuirejon. Antaŭkondiĉo por la luado estas, ke la veturo al la loko de la kampadvagono okazu perfervoje. Krome ekzistas la eblo lui iamajn stacidomojn por 4-6 personoj. Ankaŭ la Germana Federacia Fervojoj projektas imiti tiujn aranĝojn. (Niaj legantoj memoros, ke similz instigo estis farita jam antaŭ jaroj de nia s-ano Benders el Mannheim).

En la hoteltrajno tra Sudafriko

La Sudafrikaj Fervojoj aranĝas rondvojaĝojn 14-tagaĵn per „rulantaj hoteloj“, simile al la Svedaj Ŝtatfervojoj. Tiuj specialaj trajnoj konsistas el luksaj litvagonoj, restoracivagonoj kunk limataj instalaĵoj kaj salonvagono. Dum la veturado profesiaj artistoj zorgas pri distraj aranĝoj. La vojaĝoj dum la vintro (majo ĝis aŭgusto) kondukas al la „Krüger Nacia Parko“ kaj al Laŭreno Margues (Mozambiko). Dum la printempo (ekde septembro) la trajnoj veturos al la Kabo de la Bona Espero,

Novaj faldprospektoj

Höör en Svedio eldonis plukoloran prospekton en Esperanto. Proksime de Höör situas Frostavallen, kie okazas ĉiusemere la „Sveda Somera Semajno“. Kontraŭ unu respondkupono la reklamilo estas havebla per „Höör bygdens Turisttrafik-förening, fako 101, Höör/Svedio“.

Ĉeĥoslovakio en nombroj nomigas faldfolio eldonita kaj havebla per „ORBIS, Praha/Ĉeĥoslovakio.“ La statistikoj komparas la rezultatojn de la antaŭmilita periodo kun la jaroj 1948, 1955 kaj 1960.

KOKO, la konata eldonejo en Kopenhago, eldonis okaze de la 47-a UE-kongreso **La Marvirineton** tradukitan fabelon de la mond fama poeto Andersen. Kolorilustraĵoj kaj eleganta bindigo igos la libron unika en la Esperantolibro. Prezo: 30 steloj = 9.— gm (DM). Recenzo sekvos.

Per plendado, per timado ofte ĉageniĝis vi; kaj suferu malagrablon, kaj feliĉon trovos vi.

Schiller
(1759-1805)

Internacia Fervoja Kongreso

La Internacia Fervoja Kongresasocio okazigis de la 17-a ĝis la 27-a de junio la 18-an kongreson en München, unuafoje en Germanio deponit sia fondiĝo. La protekto estis transparenta la federacia prezidanto d-ro H. Lübke. 600 personoj el 64 landoj, ĉefe teknikaj ekspertoj, kongresis en la Germana Muzeo. Okazis 4 plenkunsidoj kaj 25 laborkunsidoj de jenaj kvin sekcioj: traka kaj konstrua servo, fervoja transporto kaj materialo, funkciigo, ĝeneralaĵoj, kompletiga kaj anstataŭna trafiko.

La lingvajn barojn oni „majstris“ formante du lingvajn grupojn, la francalingvan kaj la anglalingvan. Pli ol 130 helantoj, inter ili multaj interpretistoj serpis. La ĉefadministracio de la Germana vederacia Fervojo malakceptis pro principo la proponon de la Germana Esperanto-Asocio, ke helpu ankaŭ Esperanto anerpertistoj resp. ke en la ĉiutage aperanta kongresgazeto aperu esperantlingva resumo de la fakprelegoj.

Schriftleitung/redakcio: Wilhelm Barnickel, 6 Frankfurt (Main) 9, Karlstr. 4-6. Sekretariat/sekretariejo: Elfriede Kruse, 6 Frankfurt (Main) 9, Karlstr. 4-6. Vorsitzender/prezidanto: Joachim Gießner, 321 Elze/Hann., Bahnhof. Manuskriptoj estu maŝinskribitaj (nur sur unu paĝo de la folio), kaj la distanco inter la linioj estu 1½.

Druck/preso: Limburger Vereinsdruckerei, 625 Limburg/Lahn